

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I.F.E.F.);  
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U.E.A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F.E.I.)  
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



# Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. I. Germano

N° 9 - 10

Septembro kaj oktobro 1960

10-a jaro

## 10-a NACIA KONGRESO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO (I.F.E.A.)

En la kadro de la 31-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto, la 12-an de Septembro je la 9 horo en salono de la mezgrada lernejo en Cortina d'Ampezzo, okazis la jara Kunveno de Itala Fervojista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.).

Malfermis la kunsidon, per enkondukaj vortoj, nia Prezidanto Kav. Zacconi. Poste la eksterlandaj reprezentantoj, S-ro L. Angermayer el Linz (Aŭstrujo), F-ino Renè Marc el Parizo (Francujo) kaj S-ro Natzel el Basel (Svislando) salutis kaj bondeziris la Kunvenon.

La Sekretario S-ro Gimelli raportis pri la agado de la Asocio kaj pri la 12-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Helsinki kaj anoncis ke la venonta I.F.E.F.-Kongreso okazos en Barcelono (Hispanujo) kun antaŭvidite tre alloga programo.

La Kasisto S-ro Catena klarigis mallonge la bilancon de nia Asocio pri la jaro 1959-1960. La Prezidanto fine resumis la laboron faritan kaj planis tiun farotan por la pli bonigo de nia Asocio kaj por la disvastigo de Esperanto inter la Fervojistoj kaj en la fervojista medio. Bedaŭrinde, kiel kutime, la nombro de la eksterlandanoj estis pli ol tiu de Italaj Fervojistoj. Mi esperis ke la alloga urbeto kie okazis tiu kunveno estus altirinta pli da Fervojistoj, sed vere tre malmultaj ĉeestis. Do ni pripensis kaj decidis ke venontjare ni elektos, ekstere de la Itala Kongreso, apartan urbon por nia Kunveno, kiu sendube okazos dimanĉe. Tiamaniere neniu Itala Esperantista Fervojisto povos esti senkulpigata se ne ĉeestos.

Fine la Prezidanto mem decidis viziti la Ĝeneralan Direktoran de la Ŝtata Fervojo por prezenti al li novan propagandan materialon kaj esperantlingvajn publikaĵojn eldonitajn de alilandaj Fervojistaj Administracioj, kaj, raportante pri la laboro farita, peti apogon kaj helpon al nia Asocio.

## ITALA ESPERANTISTO - PIONIRO 80 - JARAĜA

La famkonata Esperantisto Lia Moŝto Ekscelenca Advokato Raffaele BAGNULO festis la 29-an de majo 1960 sian 80-jaran naskiĝdatrevenon.

Mi ĝoje skribas ĉi tiun anoncon, ne nur pro la fakto ke S-ro Bagnulo atingis tiel altan aĝon en sano, sed ĉar li estas persono kiu, jen en sia publika vivo, jen en la esperantista medio, ĉiam grave elstaris.

Jam kiel juna viro S-ro Bagnulo konatiĝis kun Esperanto en Napolo. Dum la 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne sur Mer dum 1905 oni elektis lin en la tiam ĵus fondita Lingva Komitato. Post tiu okazintaĵo li estis en daŭra korespondado kun nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof. Intertempe li vigle partoprenis la nacian vivon de Esperanto. Jam dum 1904 li fondis en Napolo la Esperanto-gazeton nomitan komence "L'Esperantista" kaj pli poste "Gefratato Esperanta". Li estis la unua delegito de Universala Esperanto-Asocio en Napolo kie li gvidis la unuan Esperanto-kurson por liceaj kaj universitataj studentoj. Fondinto de la Napola Esperanto-Grupo, dum la jaroj 1906-1907, lia propagando favore al lingvo internacia atingis rimarkindan nivelon pere de paroladoj, kursoj, artikoloj, k.t.p. En Firenze li partoprenis la starigon de Itala Esperanto-Federacio dum 1910. Dum tiu jaro li eniris en la Ŝtatan Advokataron kie li atingis la plej altajn rangojn.

En ĉiuj urboj kie li vivis dum lia brila kariero li prelegis kaj gvidis Esperantajn kursojn, tiel en Napoli, Trani, Bari kaj Bologna. Post lia emeritiĝo, Adv. Bagnulo sindediĉis tute al Esperanto Movado en la Urbo Bologna kie ankoraŭ hodiaŭ, la loka Esperanto-Grupo "Achille Tellini", de li mem fondita, ĝuas lian Honoran Prezidentecon.

Dum la lastaj jaroj oni renkontas lin kiel:

- Honoran Prezidanton de la Nacia Kongreso de Esperanto en Torino,
- unu el la plej elstaraj partoprenantoj al la XXIII-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj en Romo dum la Sankta Jaro 1950,
- Prezidanton de la Organiza Komitato de Kongreso "Pro Esperanto" (tiel nomiĝis la 24-a Itala Kongreso okazinta en Bologna dum septembro 1952), sub Honora Prezidenteco de la iama Respublika Prezidanto Luigi Einaudi,
- Honoran Prezidanton de L.K.K. de la 40-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Bologna dum 1955 kiel Jubileo de la 1-a Universala Kongreso de Boulogne sur Mer. Tiu kongreso, danke al influo kaj al klopodoj de Adv. Bagnulo, havis kiel Protektantojn la tri Prezidantojn de la Itala Respubliko: Luigi Einaudi, Enrico De Nicola kaj Giovanni Gronchi. Inter la aliĝintoj al tiu kongreso estis dislotataj multaj "Donacoj de la Amikeco", agrablaj memorigaĵoj pri Bologna kaj pri Italujo. Ĉi tiun iniciaton prizorgis speciale Adv. Bagnulo interkonsente kun la Direktoro de la Provinca Turisma Entrepreno kaj de la Provinca Komercistara Asocio.

Inter la verkoj de S-ro Bagnulo, krom iu gramatiko kiu li prezentis dum la junaj tempoj kaj ankoraŭ hodiaŭ profite uzata, meritas specialan mencion la teksto por la kongresa kanto "Saluto al gegastoj" kies melodion oni ŝuldas al D-ro Ettore Desderi, Direktoro de la Bologna Konservatorio.

Krom pri Esperanto, S-ro Bagnulo, interesiĝis pri Napola dialekta poezio kiel lernanto de la fama poeto Salvatore Di Giacomo kiu laŭdis plurfoje liajn poeziojn. Li publikigis du dialektajn poeziarojn kiuj estis tre ŝatataj de la kritiko kaj de la publiko, kaj ofte premiataj, kaj kiuj lokigis lin sur unu el la plej elstaraj postenoj de la Napola dialekta poeziverkaro. Antaŭ nelonge, okaze de la legado de liaj poezioj, li surprizigis la Bolonjan publikon, per sia talenta, sonĝena, harmonia kaj sincera poeziarto.

Adv. Bagnulo estas internacie konata pro sia grava iniciato por la "Internacia tago memoriga de la Universaleco de la Kulturo" kiu ricevis laŭdojn, aprobon kaj apogon de UNESCO kaj de la plej elstaraj altranguloj de la Kulturo.

La Itala Fervoja Esperanto-Asocio, kiu havas inter siaj Honoraj Membroj Adv. Bagnulo, tutkore gratulas lin pro lia festo kaj pro lia alta merito en la Esperanta Movado. Ĝi deziras por li ankoraŭ multajn jarojn en plena saneco, kaj esperas ke li povos ankoraŭ longedaŭrigi liajn rimarkindajn iniciatojn por la plua disvastigo kaj plifirmigo de nia lingvo, kaj de nia idealo.

GIMBELLI GERMANO

#### KIEL LA FINNAJ FERVOJOJ LUKTAS KONTRAŬ LA VENTRO

Por ebligi trafikon dum vintra tempo, la finnaj fervojoj ĉiam devis fari specialajn aranĝojn je la relvoje mem kaj je la veturilaro. Krom tio estas bezonataj specialaj iloj kaj aparatoj por la forigo de la neĝo el la relvoje kaj por certigi la moveblecon de trafikforkaj pintreloj. La nuntempe uzataj neĝplugiloj, sume 92 ekzemplerojn, estas plejparte malnovtipaj, sed sufiĉe efikaj por la finnlandaj cirkonstancoj. Ili similas al malgrandaj tegment-vagonoj kun fenestroj en la flankaj kaj frontaj vandoj. La neĝplugiloj havas specialajn poŝalojn kaj puŝplatojn, kiuj estas funkciigataj per kunprem-aero ricevata el la trakeianta lokomotivo. Inter la neĝforigiloj estas ankaŭ kelkaj novtipaj neĝoĵetiloj, tio estas neĝplugiloj provizitaj per rotaciantaj padeloj, kapablaj ĵeti la neĝon pli malproksimen de la relvoje. Unu el ili estas konstruita laŭ kanadaj modeloj. En ĉi tiu tipo la padeloj ricevas movan forton el vaporaldrono troviĝanta en la trunko de la plugilo. Pli bonan tipon reprezentas tamen la tri t.n. Boilback-neĝoĵetiloj. Ili enhavas du diesel-motorojn, la pli malgranda, 72-ĉevalforta, donas trakeiforton kaj la pli granda, 220-ĉevalforta, movas la rotaciantajn padelojn. La padelrado estas fiksita rekte en la fino de la krankŝafto, kaj per reguligo de la rotacia rapido de la motoro, oni povas reguligi ankaŭ la rapidon de la padelrado kaj la ĵetdistancon de la neĝo. Tiu distanco povas atingi 35 metrojn, kaj tiel eĉ multneĝa loko estas plugebla tiel ke ne fariĝas altaj neĝmuroj.

Per forigo de glacio la finnaj fervojoj uzas specialajn glacirabotilojn. Ili similas al malkovritaj vagonoj provizitaj per fertikaj dentigitaj tranĉplatoj. La rabotiloj estas ĉu mekanikaj, tio estas manforte uzablaj, ĉu funkciantaj per kumprem-aero. La finnaj fervojoj posedas 12 ekzemplerojn de tiaj glacirabotiloj.

La moviĝantaj partoj de la trako, la pintreloj, bezonas specialan prizorgadon. Ilian noveblecon oni devas certigi per senneĝigo, ĉu manlabore, ĉu per specialaj aparatoj. Prove estas uzataj kelkaj elektraj varmigiloj kaj kumpremaeraj bloviloj.

Specialan malfacilaĵon por la finnaj fervojoj kaŭzas la traglaciigo de la relvoja platformo. Plejparte la relvoja platformo en Finnlando konsistas el ordinara grajneta gruzo, kiu ne bone tralastas akvon. Vintre la spaloj ne povas esti levataj kiel ordinare dum riparlabore. La reniveligon oni devas fari per la metode, nomata "kejnado". Tio signifas, ke oni metas diverdikajn lignajn plandumojn inter reloj kaj ŝpaloj. Komprenoble estas ege malfacile tiamaniere teni la relvojn ebena.

Krom la Traka Departemento, kiu prizorgas la taskojn supre prezentitajn, ankaŭ la Veturilara kaj Trakeia Departemento devas entrepreni iajn aranĝojn per kaj dum la vintre. Ekzemple el la lokomotivoj oni forigas la flugfajrero-retenilojn de la kamentuboj kaj eindrujoj. Ili ne estas bezonataj vintre, ĉar bruldangero ne ekzistas, kaj krom tio ili vintre facile stopiĝas kaj malhelpus efikan produktadon de vaporo. koncerne la vagonoj estas necese rimarkigi pri la hejtado, kiu devas esti bone prizorgata. Kaj la frost-difekteblaj varoj kaj la pasaĝeroj devas esti ŝirmitaj kontraŭ la malvarmo. La specialaj ŝarĝvagonoj estas ĝenerale varmigataj per kamenoj, kaj la pasaĝervagonoj per vapor- aŭ varmakvo-hejtado. Speciale la varmakvo-hejtado estas favorata en Finnlando.

Supre estas prezentitaj la plej gravaj kaj okulvideblaj trajtoj de la lukte kontraŭ la vintre. Kelkaj aranĝoj en la trafika funkciado kaj kelkaj eksperimentoj per novaj aparatoj devis esti preterpasitaj en ĉi tiu resumo.

(resumo de la parolado de S-ro NARVALA, Prezidanto de L.K.K. en Helsinki)

#### LA "VOĈO DE AMERIKO" ELSENDOS ESPERANTO-PROGRAMOJN PRI USONAJ ELEKTOJ

Okaze de la nunjaraj usonaj elektoj "Voĉo de Ameriko" disaŭdigos serion de tri 30-minutaj radio-programoj en Esperanto en la tri vendredoj antaŭ la elektotago, de la 21-an de oktobro, la 28-an de oktobro kaj la 4-an de novembro 1960. Ili konsistas el raportoĵoj pri la elektobatalo, intervjuoj, biografiaj informoj kaj respondej je demandoj ricevitaj el la tuta mondo. La programoj estos aŭdeblaj sur ses ondlongoj. Per atingi diversajn partojn de la mondo, ĉiu el la tri programoj estos disaŭdigata kvarfoje: je la 12-a horo (M.E.T.) sur ondlongo de 41,90 metroj (7160 kc.) -ĉefe per Orienta Azio, je la 13-a sur 19,72 metroj (15210 kc.) -ĉefe per Sudorienta Azio, je la 23-a sur 31,20 metroj (9615 kc.) -ĉefe per Eŭropo kaj la apudaj regionoj de Azio kaj Afriko, kaj 25,26 (11875 kc.) same, je la 4-a kaj dueno sur 19,83 metroj (15130 kc.) kaj 16,92 metroj (17735 kc.) -ĉefe per Suda, Centra kaj Norda Ameriko. La diversaj programoj estas aŭdeblaj ankaŭ en aliaj partoj de la mondo.

En ĉi tiu serio du radiosendiloj direktataj al Suda kaj Centra Ameriko estas uzataj unufoje per Esperanto-programoj de la "Voĉo de Ameriko". Ili troviĝas en Okcidenta Usono. La aliaj radio-stacioj uzataj per la serio troviĝas en Okinaŭa (Rjukju-Insuloj), Manila (Filipinaj Insuloj) kaj Tanger (Maroko).

La rezultoj de la antaŭaj radio-programoj de la "Voĉo de Ameriko" en Esperanto estis "kuragiĝaj" laŭ dire de ambasadoro George V. ALLEN, direktoro de la Usona Inform-Serve. Ĝis la 25-a de julio preksimume 950 leteroj el 65 landoj atingis la "Voĉo de Ameriko" pri la Esperanto-programoj.

Raportoĵoj pri la ricevo kaj opiniesprimej pri la enhavo estu sendataj al: D-ro William SOLZBACHER, Voice of America, Rm. 2528, HEW, WASHINGTON 25, Usono. (El "LA PRAKTIKO").

#### DEZIRAS KORESPONDI

- Tramista Esperanto Societo - Redekancara ulica, 239 ZAGREB V° (Jugoslavio)
- KOZARIC Stjepan - LEKENIK 70, Kroatie (Jugoslavio). Tramisto, d.k. pri muzikaj netoj
- MAJSEC Anica - Severinska ul. 17 ZAGREB V° (Jugoslavio). Junulino 15-jaraĝa, d.k. kun knaboj aŭ knabinoj samaĝaj pri infanaj temoj.
- Aleksandre KAJTI - Str. Terèz n-re 9 PECS (Hungario)

ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA - ESPERANTO FAKO - Casella Postale 320 ROMA (Italia)

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.). - Ondlongoj: metroj 30,90 = Mc/s 9,71; - metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s. 5,96.

Prelegantoj: mardo: alterne S-ro L. Minnaja kaj Prof. D-ro V. Musella

merkredo: S-ro Luigi Minnaja kaj vendredo: Prof. D-ro Vincenzo Musella.

DISSENDOJ EN ESPERANTO - JARO 1960. - Ĉiujn merkredoj: Kuriero de Esperanto.

OKTOBRO 1960-a - mardon la 4-an: Tra la literaturo - vendredon la 7-an: Histeria-arta ekspozicie pri la sperte en Romo - mardon la 11-an: Leterkeste kaj bibliografie - vendredon la 14-an: Grandaj Sanktuloj: Sankta Tereza el Avila - mardon la 18-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 21-an: Novaĵoj el Italujo - mardon la 25-an: Italaj verkistoj: Massimo Bontempelli - vendredon la 28-an: Italaj turismaj urboj: Taormina.

NOVEMBRO 1960-a - mardon la 1-an: Tra la literaturo - vendredon la 4-an: La itala komika aktoro Marie Riva - mardon la 8-an: Novaĵoj el Italujo - vendredon la 11-an: Leterkeste kaj bibliografie - mardon la 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto - vendredon la 18-an: Italaj provincoj: La Spezia - mardon la 22-an: Romaj baziliko: Santa Cecilia in Trastevere - vendredon la 25-an: Latinaj dramistoj: Plautus - mardon la 29-an: Italaj belartaj urboj: Gaeta kaj Fomia.

La Faktestro: L. MINNAJA

R E C E N Z O J

Kie abunde estas malforta kaj manko pli malforta: Danio. - Eldonanto: la Ministerio pri Eksterlandaj Aferej en Danlando. Paĝoj 32. 21 x 14 cm.

La tekston verkis Johannes Lindskov Hansen, kaj la broŝuro, riĉe ilustrita, rakontas pri la lando kaj ĝia ĉefurbo, pri la Dana popolo, lia vivo kaj okupo, k.t.p. Mallonge: ĝi estas bonega enkondukilo en danajn aferojn, speciale redaktita por eksterlandanoj.

Estas la unua fojo, ke la Dana Ministerio pri Eksterlandaj Aferej eldonas oficialan publikaĵon en la internacia lingvo, kaj certe la Esperanta publiko sentos sian interesecon per ĝi. La belega libreto estas senpage havebla nur ĉe la diplomaciaj reprezentantoj eksterlandaj, tial oni sin turnu al la plej proksima Dana konsulejo aŭ ambasadejo.

Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Vien. Parte II: Sistema katalogo pri la presaĵoj de la NE-Esperanto-Artefaritaj Lingvoj (Volapuk, Ide, Interlingva, k.t.p.) laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko. Verkita de Hugo Steiner. Eldonis: I.E.M.W Wien I, Hofburg, Aŭstrujo. Paĝoj 93. 21 x 29 cm. Prezo 14 respondkuponoj.

ESPERANTO-EKSPOZICIO EN SONDRIO (ITALUJO)

Nova Esperantista Grupo en Sondrio, per interesigi la publikon, decidis organizi Esperantan ekspozicion en Sondrio dum venanta aŭtuno.

Tiacele ni petas sendi ĉiam esperantaĵon ne pli malfrue ol en la fine de oktobro 1960. Adreso: Via Caini N-ro 8, SONDRIO (Italujo).